



VERDA IDEOLOGIO — AGANTA SOLIDARECO

*Konciza resumo de la partia programo de la Verda Partio de Svedio
(Miljöpartiet de Gröna)*

Tio ĉi estas konciza resumo de la partiprogramo de la Verda Partio de Svedio (Miljöpartiet de Gröna) Dum ĝi estis verkata, miloj da homoj kontribuis per pensoj, politikaj sugestoj, vortoj kaj ideologia debato. Tio per si mem estas unu el la fundamentoj de la verda ideologio. La politiko kaj la socio – estas io, kion ni kreas kune. Ĝi estas nia komuna voĉo.

Vi povas legi nian tutan partiprogramon en la sveda sub la adreso www.mp.se.

Miljöpartiet estas parto de tutmonda movado strebanta al mondo, en kiu ĉiuj homoj povos vivi bonan vivon, ne malbonigante la kondiĉojn de venontaj generacioj. Nia politiko baziĝas sur la koncepto, ke ĉio interrilatas.

La homaro staras antaŭ grandaj defioj. Politiko estas la ŝlosilo al ŝanĝo kaj ĝi devas montri la vojon al daŭripova socio. Ni verduloj kunligiĝas de la komuna tasko formi nian socion por nova epoko.

Miljöpartiet estas feminisma partio. Diverseco kaj egaleco, seksa kaj alia, estas bazoj por justa socio. Ni estas konvinkitaj, ke malsamecoj inter homoj riĉigas la mondon.

Nia politiko baziĝas sur tri solidarecoj:

- solidareco kun bestoj, naturo kaj la ekologia sistemo
- solidareco kun venontaj generacioj
- solidareco kun ĉiuj homoj en la mondo.

La homo

La homo estas krea kaj empatia estaĵo, kiu volas kaj povas esti respondeca. Homaj ideoj estas mirinde multaj kaj pelas la evoluon antaŭen. Ni kredas je demokratio kun aktivaj kaj partoprenantaj civitanoj. Tio postulas facilan alireblon al informoj, viglan politikan debaton kaj eblon por civitanoj prezenti proprajn sugestojn al politikaj organoj.

La verda movado reprezentas liberecan perspektivon en la politiko. Novaj ideoj floras, kie homoj estas liberaj pensi kaj opinii kaj kie pensoj, vizioj kaj diverseco estas respektataj. Ĉiuj havu egalajn rajtojn kaj eblojn – senkonsidere de sekso, etneco, religio, handikapeco, seksa orientiĝo, identeco kaj esprimo, kaj aĝo.

Infanoj kunkreas la socion kaj ne estas nur pasivaj ricevantoj de tiu socio, kiun plenkreskuloj kreas por ili. En la media politiko longa perspektivo necesas, engaĝo por la infanoj estas ankaŭ investo en la estontecon.

La lernejoj donu al ĉiu infano eblon disvolviĝi. Ne ekzistu sukcesaj kaj malsukcesaj lernantoj, ankaŭ ne bonaj kaj malbonaj lernejoj. La politiko provizu kondiĉojn por lernejoj, kie la scivolemo de la lernantoj kaj la kompetenteco de la instruistoj povu plene manifestiĝi. Ni kredas je la popolkleriĝo kaj dumviva lernado. Kiam ĉiuj ricevos eblon elekti sian vojon tra sia vivo, ni povos kune konstrui fortan socion.

Ĉiuj homoj ricevu egalajn eblojn realigi siajn revojn. Ĉia diskriminacio estu rezistata kaj neniu suferu rasismon aŭ krimojn de malamo.

La medio

La verda ideologio temas ne nur pri la reciprokaj rilatoj inter homoj, sed ankaŭ pri nia dependo de ĉio ĉirkaŭ ni. La homa respondeco etendiĝas ekster la propra persono kaj ekster la propra generacio. Bestoj havas rajton kondukti nature ne estante viktimoj de homkaŭzata sufero.

La vivstilo en la riĉa parto de la mondo havas sekvojn ankaŭ ekster la limoj de tiuj landoj. Ni devas reorganizi niajn sociojn tiel, ke ni estontece povos vivi bonan vivon sen samtempe detrui la eblojn por ni mem, por homoj en aliaj landoj kaj estontaj generacioj.

La klimatŝanĝoj minacas nian estontecon. Ili influas la vivojn de unuopaj homoj, la tutmondan ekonomion kaj la transvicon de tutaj nacioj. Malgraŭ nia scio pri tio, la emisioj de tervarmigaj gasoj daŭre kreskas. Ni estu gvidaj en la procezo redukti la homan efikon sur la klimato. Historie Svedio kaŭzis, kaj daŭre kaŭzas, signife pli grandajn emisiojn ol estas daŭripove. Svedio havas unikajn eblojn gvidi la ŝanĝon al daŭripova socio kaj montri la eblojn eblojn por alia evoluo. Tio postulas kuraĝan medipolitikon. Ni verdpartianoj estas konvinkitaj, ke klimatoruza socio ankaŭ estas socio pli bona por homoj.

La ekonomio

La mondo bezonas novan ekonomian politikon. Konstanta ekonomia kresko en tradicia formo ne eblas sur planedo kun limigitaj resursoj. Temas pri kelkaj memevidentaj principoj:

- Kio bonas por homoj kaj medio estu malmultekosta.
- Kio malbonas por homoj kaj medio estu multekosta.
- Kio estas tro damaĝa estu malpermesita.

Homa inventemo ebligis la rapidan ekonomian evoluon de la lastaj jarcentoj. La evoluo estis multmaniere pozitiva, sed samtempe la konsumo de resursoj kaj la emisioj de tervarmigaj gasoj kreskis. La biologia diverseco malkreskis. Kun novaj prioritatoj kaj novaj manieroj mezuri bonfarton ni povos konstrui ekonomion, kiu ne dependos de konstanta kresko.

Ni estas konvinkitaj, ke daŭripova socio postulas kuraĝon en farado de politikaj decidoj. Ankaŭ kiam la valoron de la decidoj eblas difini per la kutimaj mezuriloj de tradicia kresko.

La alireblo al karbo kaj nafto kaŭzis grandajn emisiojn de tervarmigaj gasoj. Fari ŝanĝon al pli longperspektiva ekonomio grandparte egalas al ŝanĝo de la energia siste-

mo. Ni devas uzi la energion pli efike kaj la proporcio de renovigebla energio devas esti centprocenta.

Ni volas vidi socion sen nuklea energio. La nuklea energio enhavas tro grandajn riskojn kaj postlasas radiaktivajn restaĵojn al venontaj generacioj.

Se ni ne ŝanĝas la energisistemon nun, en bonordaj formoj, la manko de resursoj devigos ŝanĝon pli malfrue. Tiam je multe pli granda kosto por unuopaj civitanoj, entreprenoj kaj tutaj nacioj.

La bonstato

La bonstato devas doni al homoj liberecon, vivkvaliton kaj sekurecon. Kune ni estas plej fortaj, kiam ni zorgas unuj por aliaj dum ni estas plej rompeblaj. Tial la socio devas oferti flegon, varton kaj prizorgon, kiam ni tion bezonas. La socio ankaŭ devas zorgi, ke ekzistu asekura sistemo por malsanuloj kaj senlaboruloj. Estas konvene kaj saĝe, ke riĉuloj kontribuu pli al la komuna bono.

La sanservo en Svedio estu egaleca kaj moderna. Por bonigi la sanstaton de la popolo estas same grave engaĝiĝi por preventa zorgado de la sano kiel por flegado de malsanuloj.

Ni volas doni al regionoj kaj komunumoj pli grandan potencon pri politikaj decidoj, kiuj koncernas ilin. Senkonsidere kie en la lando vi loĝas, vi havu alireblon al gravaj funkcioj de la socio, ekz. polico, poŝto kaj fiksita telefonkonekto. Svedio bezonas ripari la malnovajn loĝejojn konstruitajn en la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj, sub la nomo Miljonprogrammet. Ne devas ekzisti regionoj en Svedio, kie la loĝantoj sentas, ke ili devas transloĝiĝi por havi ŝancon al bona vivo.

Ni havas vizion, ke ĉiuj, al kiuj mankas enspezoj, havu garantion de vivebliga apogo, senkonsidere de pli frua enspezado kaj senkonsidere de tio kial enspezoj mankas. Ni deziras komunan asekuran sistemon administratan de aparta instanco. Ni kutimas diri, ke devas esti unu sola enirpordo por eviti, ke individuoj eksteriĝas el la sistemo.

La aktiveco de la bonfarta sistemo ne devas esti administrata kiel ajna merkato. Ni ne estas konsumantoj rilate bonfarcon, ni estas civitanoj. Pagitaj impostoj iru al la destinitaj celoj, ne al profito.

La mondo

Multaj homoj en la mondo nun leviĝas el malriĉeco. Bonstato vastiĝas, la averaĝa vivodaŭro longiĝas kaj la mortado de infanoj malpliĝas. Samtempe la homaro renkontas novajn defiojn en formo de mediaj minacoj kaj troa ekspluatado de naturaj resursoj. La tasko de la verda movado estas trovi vojojn, por ke pli da homoj povu partopreni la bonstaton, dum ni samtempe alfrontas klimatajn kaj mediajn ŝanĝojn.

Miljöpartiet varme apogas internacian kunlaboron. Samtempe ni volas, ke potenco estu ĉe tiuj, kiujn trafas la potenco. Pro tiu konvinko ni estas skeptikaj al centra direktado kaj decidoj, kiuj movas potencon for de la civitanoj.

Miljöpartiet estas partio kritika kontraŭ EU. Ni volas, ke EU evoluu al pli fleksema kunlaboro, kie ĉiu membroŝtato povu elekti tiujn partojn, en kiuj ĝi volas partopreni. Svedio restu ekster EMU.

La kontribuoj de Svedio al paco kaj subteno al malriĉaj ŝtatoj ne estas kredindaj, se ni samtempe eksportas armilojn al diktatoraj kaj malriĉaj landoj. Justa kaj daŭripova globala evoluado devas havi prioritaton antaŭ miopaj ekonomiaj interesoj.

Miljöpartiet de gröna havas vizon de mondo sen limoj, kie ĉiuj homoj povu transloĝiĝi, sed neniu estu devigata fuĝi. Ni ne kredas je la rajto de landoj elekti siajn enloĝantojn, ni kredas je la rajto de homoj elekti loĝlokon. Homoj renkontu eblojn, ne murojn. Ni fieras esti tiu partio, kiu estas plej malfermita al migrado.

Vojtrovantoj

Miljöpartiet estas politika partio kaj samtempe ni estas pioniroj. Ni estas kaj antaŭ nia tempo kaj meze de ĝi. Ni ne devas perdi la kontakton kun tiuj, kiuj postvenos. Ankaŭ ne estas tempo por perdi. Ni kuraĝas esti fruaj.

Zorgantaj kaj engaĝitaj homoj ŝanĝas la mondon. Ĉiu evoluo komenciĝas per la konvinko kaj engaĝiĝo de unuopaj homoj. Vi kreas diferencon!

Tio ĉi estas konciza broŝuro de la partiprogramo de Miljöpartiet de gröna. Ĉi tie vi povas legi pri niaj vizioj kaj tiu ideologio, kiuj estas la bazo de niaj politikaj proponoj. Eblas legi pli pri nia politiko en la sveda sur la paĝo www.mp.se Tie vi trovas ankaŭ la tutan partiprogramon. Tie troviĝas ankaŭ la tuta partiprogramo.